

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro

N-ro 202/203 (2017:2,3)

Apr – Sep 2017



**Memore al
Zamenhof**

**Babilado kun...
Nazaré Laroca**

**Vivstilo:
Legado kaj
Cirkoekzercoj**

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro

N-o 202/203 (2017:2,3)

Apr - Sep 2017

76-a jarkolekto

Redaktas: P. S. Viana

Aranĝas: Allan Argolo

Ĉi-numeraj kunlaborantoj:

Nazaré Laroca, Paulo Nascentes,
Affonso Soares, Aleksandro Prado,
Anna Lobo, Dirce Sales kaj
Tatjana Loskutova

Kovrilo:

Bildo el www.zamenhof.info



Associação Esperantista do
Rio de Janeiro

Rua Teófilo Otoni, 135 / 302
telefone: 2467-4296



disvastigo.aerj@gmail.com




www.aerj.org.br



facebook.com/aerj.esperanto




youtube.com/user/TVaerj



Rio Esperantista

Informativo da Associação Esperantista do Estado do Rio de Janeiro

Edição quadrimestral setembro - dezembro / 2010



RIO



ESPERANTISTA

OFICIALA ORGANO DE ASOCIO ESPERANTISTA DE RIO DE JANEIRO Nº 18 JANUARO - MARTO 1997



Enhavo

El la Redakcio	3
Babilado kun Nazaré Laroca	4
Recenzo: Birda Grundo	6
Raporto: E-o en la Librobiendalo	8
Kovrilo: Memore al Zamenhof	10
Kroniko: Du minutoj	17
Nekrologo: Floriano Pessoa	18
Vivstilo:	19
C. T. Pastorino kaj Esperanto	22
Vojaĝo (Tatjana Loskutova)	23

Vortoj de (provizora) redaktoro

Estimataj legantoj,

Por redaktado de ĉi tiu numero de *Rio Esperantista* min komisiis la estraro de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro. Tion kaŭzis momenta neebleco, flanke de la oficiala redaktoro, Prof. Fernando Pita. Kompreneble, mi ne rajtis rifuzi la taskon, eĉ konsciente, ke la revuo pro tia ŝanĝo nepre suferas falon en la kutima enhavo. Mi petas vian indulgon.

Aliflanke, mi devas esprimi al vi, tute amike, la angoron de vic-redaktanto, kiu devas kunmeti novan numeron de la revuo en relative nelonga tempo. Mi tuj skribis al la konataj verkemuloj (vivu interreto!). Pluraj el tiuj tuj reagis kaj sendis al mi siajn kontribuojn. Malgraŭ ĉio, mi supozas, ke ni povas proponi al vi

dignan numeron de nia tradicia revuo. Kaj mi havas la moralan devon publike danki al la aŭtoroj, kiuj klopodis jese reagi al mia peto.

Al unu aparta kontribuinto mi deziras esprimi apartan dankon (mi petas pardonon al la ceteraj, kies nomojn mi ne eksplicite mencias ĉi tie). Temas pri unu el niaj eminentuloj, la estimata, respektata “majstro” Affonso Soares. En ĉi tiu jaro 2017, kiam oni memoras la forpason de Zamenhof, li sendis al ni vere brilan artikolon. Estas por mi honoro, ke li flanken lasis ĉiujn siajn multajn okupojn por malavare reagi al mia peto. Mi pensas, ke lia teksto, en ĉi tiu numero de *Rio Esperantista*, estas speco de fajna donaco al la Esperantistoj de nia ŝtato.

P.S.V



Maria Nazaré Laroca sin montras nuntempe,
 en la panoramo de la brazila movado,
 kiel unu el niaj plej viglaj voĉoj.
 Ŝia ĉefa agadkampo estas Poezio kaj prelegoj.
 Ni proponis al ŝi kelkajn demandojn, kun la celo,
 ke niaj legantoj de pri proksime ekkonu la vidpunktojn
 de tiu sentema, saĝa, ekzemplodona Esperantisto.



Rio Esperantista: Kiam, kial kaj kiel vi fariĝis Esperantisto?

Nazaré Laroca: Esperanto trafis mian koron en la 1-a de Januaro 2003. Matene, tuj post mia ellitiĝo, subite venis al mi en la kapon la jena ordo: “*Nazaré, vi devas studi Esperanton.*” Surprizita, mi rimarkis la verbon *studi* (fakte ĝis nun mi studas nian lingvon) kaj la vorton *Esperanton*, kiun mi supraĵe konis. Mi serĉis la Kulturalan Esperanton Asocion de Juiz de Fora, kaj aliĝis al feria Esperanto kurso, tiam gvidata de Prof-ino Ângela Faria. Kaj do estis amo je la unua leciono. Mia fako ĉe UFJF estis Morfologio de la portugala lingvo; tial mi enamiĝis pri la mirinda esperanta morfologio. Kaj mia amo al Esperanto kaj al Zamenhof plu kreskas ne nur pro la magio de la lingvo sed ankaŭ pro ĝia ideologio de paco kaj kunfratiĝo inter la popoloj.

RE: Kion signifas por vi la vorto “poezio”?

NL: Estas plursenca tiu vorto. Eble poezio estas surpriza amsparko, kiu ekfrapas nian okulon, kaj intense feliĉigas nian animon. Poste oni fasonas ĝin per vortoj, kaj naskas poemon. Al mi plaĉas la difino de la brita poeto William Wordsworth, nome “Poezio estas emocio kolektita en trankvileco”.

“ poezio estas surpriza amsparko, kiu ekfrapas nian okulon, kaj intense feliĉigas nian animon ”

RE: Ĉu verkado de poezio en la portugala lingvo kaj en Esperanto estas por vi la sama sperto?

NL: Ne. Bedaŭrinde mi ankoraŭ ne pensas tut-tempe tute en Esperanto. Unue mi verkas poemon portugal-

lingve, kaj poste mi ĝin tradukas esperanten.

Tamen, plurfoje, kaj mirakle, dekojn da poemoj mi verkis rekte en Esperanto por la poemaro *Penseroj* (2013).

RE: Vi estas membro de akademio de beletro en via urbo Juiz de Fora (MG). Kiu estas la sinteno de la aliaj akademianoj rilate al Esperanto?

NL: Jes, mi estas ano de la Beletro Akademio de Juiz de Fora ekde 2002. Inkluzive mi jam prelegis pri Esperanto ĉe la Akademio. La akademianoj elmontras respekton kaj admiron rilate al nia lingvo. Ili multe aplaŭdas miajn versaĵojn kaj raportojn pri la vojaĝoj al eksterlando por la Universalaj Kongresoj.

RE: Vi jam nun aperigas du libroformajn poemarojn en Esperanto. Kiu estas la diferencoj inter ili?

NL: La unuan, *Penseroj* mi aŭdacis verki tute en Esperanto, kaj mi havis la honoran eldonon fare de Francisco Wechsler, krome menciinda estas, ke la libro estas riĉigita de via mirinda enkonduko.

La nova poemaro *Birda Grundo* (*Chão de Pássaros*), publikigita de Eldonejo Lorenz, estas dulingva kaj enhavas brilan enkondukon de la

Poeto Paŭlo Nascentes. Elkore mi dankas al vi ĉiuj.

RE: Laŭ via gusto, kiu estas ĝis nun la plej bona libro, kiun vi legis en Esperanto? Kial?

NL: Estis la novelaro *Okuloj*, verkita de Marjorie Boulton (La Laguna: J. Régulo, 1967). Boulton prezentas, laŭ sia speciala poezia rigardo, rafinitan kaj amuzan kolektaĵon de rakontoj, kies protagonistoj estas virinoj. Por mia doktoriĝa disertacio mi laboris pri la ĉarma rakonto *Lernantino*.

RE: Se vi povus doni konsilon al juna poeto (kiel Rilke!), kion vi dirus?

NL: Dio mia! Rilke estas unu el miaj plej ŝatataj poetoj (kune kun Federico Garcia Lorca), kies poemoj mi legis dum la fruaj studentaj jaroj.

Mi dirus tiel, kiel Drummond diris al mi per privata l etero: “verki poemojn estas tondi vortojn.” Do poemo devas esti riĉe simpla. Kaj mi profitas por memori ĝin instigan version de fama poemo lia: *Ĉu vi alportis la ŝlosilon?*



Boulton, Marjorie. *Okuloj* (Novelaro). La Laguna: J. Régulo, 1967. 177 p. Stafeto;

La poezia libro *Birda grundo* kaj la honoriga tasko verki ĝian antaŭparolon

Paulo P. Nascentes

Amikeco estas delikata grundo. Same, la arto poeziumi. En ambaŭ manko aŭ troigo de vorto povas esti danĝera. Pro manko aŭ abundo de vortoj poemo riskas fiaski. Amikeco ankaŭ. En la poemaro de Nazaré Laroca tamen konstatablas, ke ĉiu vorto oportunas. Ĉiu poemo atingas tiurilate la ĝustan mezuron. Se estas vero, ke grandan ĝojon nin donas geamikoj nin invitantaj fariĝi baptopatro de filo, same ĝojiga estas la invito verki antaŭparolon pri poezilibro de admirinda poeto. Honorigas min la elekto prepari enkondukajn vortojn pri *Birda grundo*, la plej ĵusa libro de tiu leginda brazila poeto. El tiu antaŭparolo oni permesu min transskribi sube la unuan alineon.

Babile kun Verso kaj iu Prozo

“La tago malfermiĝas / petaloj de suno kaj perplekso / pri l’ mistero de l’ ekzisto. // Kaj dancas sur birda grundo / ŝtalfloroj, kiujn mi kultivas sur la eĝoj de l’ poezio”.
(Laroca, Maria Nazaré. Improvize.)

Birda grundo, alloga poemlibro, estas himno al poezieco – tiu nemateria eco, tamen perceptebla, kiu trablovas la altkvalitan literaturon. Samkvalitas ĝi al la bona tradicio de la brazila kaj tutmonda lirika poezio. Dialogas ĝi pli aŭ malpli eksplicite kun grandaj nomoj: sur tiu grundo kunfratiĝas poembirdoj de Drummond, Quintana, Machado de Assis, Neruda, Baudelaire, Petrarca, Dante Alighieri. Trejnataj pepadoj en la Arto de l’ Kanto, Ravo, Renkonto. Muzikreĝisoro laŭofice, Nazaré Laroca regas la simfonion de sonoj, koloroj, akurata ritmo, simpla melodio, sencoj neatenditaj kaj rimoj disaj. Kaj portugale kaj esperante, la sama leksika zorgo, la

lingvaĵo flua de milda kaj matena rivero, de petolaj birdoj dum la Vivocelebrado.

Fakte la sperto krei poeziaĵon rezultas parte el la rafinita kapablo zorgeme observi propran kaj alies vivokazaĵon – la plej banalaj – kaj el tiu foje kruda materialo rekrei realon pli bela, pli brila, pli eĉ kvazaŭ vivanta per neatenditaj poeziaj imagoj vestitaj el ĉiutagaj vortoj, tamen preskaŭ debutantaj pro la novaj sencoj venigitaj el ili. Eble pro tio bonaj poemoj tiom nin allogas kaj surprizigas.

Kiel diable per vortoj tiom simplaj, esprimoj tiom oftaj en ĉiutagaj kuntekstoj, poetoj sukcesas diri belajn nedireblaĵojn kaj, pli mirinde, foje per tiom originalaj dirmanieroj! Ne malofte

la vorto *mistero* asociiĝas al la poezifarado, io kio trafingre kutime eskapas al la tielnomata *ordinara* homo. Aparte rimarkebla estas tiu menciita trajto en la poezia stilo de Nazaré Laroca. Fluas verŝajne simplaj versoj kies enhavo kaj sencoj povas esti profunde filozofaj, pensigaj, mistikaj, malgraŭ tio (ĉu ĝuste pro tio?) ke la vortordo, vortelekto, vortumado fine estas tre konataj, uzataj, ne-atenditaj, tamen! Kelkaj ekzemploj tion facile evidentigos.

Esperantlingve ricevis komentariojn de du poetoj la poemo *Improvize*, legebla supre ĉe la epigrafo de tiu ĉi recenzo.

La unuan surbloge verkis ĉi artikolisto mem: *Giganta estas "perplekseco pri l' mistero de l'ekzisto", tamen ne nepre pli granda ol la mistero de poezio, tiu "kultivo de ŝtalfloroj sur grunda birdo"*.

La granda de mistero ja misteras ĝi mem. Bele. Sed plie direblas: a) konfirmiĝas la atingo de bela poezia efiko per lingvaĵo flua de milda kaj matena rivero; b) la simpla melodio venas el rimoj disaj (koincido de sama forta

vokalo) kaj metroj proksimaj (6+9+7+7+8+8); kaj fine, c) sencoj neatenditaj rezultas el vigla mikso de substantivoj *konkretaj* ('petaloj', 'suno') kaj *abstraktaj* ('perplekso'). Daŭras tia rilato ĉe la paroj: 'mistero'/'ekzisto'; 'danci'/'birda grundo'; 'kultivi'/'ŝtalfloroj'; 'eĝoj'/'poezio'.

La duan verkis la poeto Paulo Viana: *"danci sur birda grundo" estas samtempe tre delikata kaj tre forta metaforo. Produkto de vera, elkora Poeto. Ankaŭ la leganton trafas perplekso antaŭ tia profunda poezio.* Kaj mi aldonas – *tia profunda poezio* sinteze devenas ĝuste el tiuj ĉiutagaj vortoj... poeziigitaj de la rafinita talento de Nazaré Laroca. Jen parto de la mistero, kiun trovos la leganto de la ceteraj poemoj de tiu rekomendinda *Birda grundo*.

Konklude indas atentigi la legantaron ŝatantan poezion, pri tio ke multaj bonaj poemoj troviĝas nuntempe en bonkvalitaj blogoj, plejparto el kiuj estas dulingvaj, kaj en la patrina kaj en Esperanto. Bela defio: kaj el la vidpunkto de la poezi-verkanto, pro la venigo de poezieco per lingvoj tiom diferencaj; kaj el la vidpunkto de la leganto, pro la rafinita plezuro malkovri la solvojn proponitajn de la Aŭtoro dum la plenumado de tiom delikata, sed plezuriga, elektita tasko! Kulture sendube gajnas ĉiuj!



Laroca, Maria Nazaré.
Birda grundo (Poemaro).
Eldonejo Lorenz, 2017

La duan fojon esperanto estis amase disvastigita en la internacia librobienal de Rio-de-Janeiro. Dum 11 tagoj, miloj da homoj eksciis pri esperanto pere de faldfolioj, libroj, filmetoj kaj amikaj babiladoj kun la deĵorantoj.


Refoje la esperanto-stando lokiĝis en la verda pavilono kaj kelkaj vizitantoj eĉ memoris pri la agado en la antaŭa eldono de la evento. Des pli bone: kelkaj ĉi-jaraj volontuloj estis simplaj vizitantoj en 2015, kio ja

montras la valoron de tiu projekto.

Inter la pozitivaj aspektoj de la ĉi-jara eldono, estis specifa agado por instruistoj kiuj vizitis la standon. Al ili oni donacis la broŝuroj *Descubra o Esperanto*, la komikso *Esperantistas* (eld. EASP) kaj teksto pri la landaro BRICS kaj Esperanto.

AERĴ kore dankas al ĉiuj donacantoj kiuj subtenis tiun laboron kaj al ĉiuj esperanto-organizoj kaj volontuloj kiuj kontribuis al tiu festo de la disvastigado de Esperanto.





Centjara datreveno de la morto de Zamenhof

Affonso Soares

Antaŭ cent jaroj, la 14an de Aprilo 1917, post longa suferado pro kormalsano, mortis en Varsovio, Pollando, la iniciatinto de Esperanto, Ludoviko Lazaro Zamenhof.

Tiam la homaron ankoraŭ afliktis la hombuĉadoj dum la Unua Mondmilito (1914-1918).

Zamenhof ege suferis pro la ŝajna renverso de la homfratigaj idealoj de Esperanto, al kiuj li oferis sian tutan vivon. Tre povas esti, ke tiu socia katastrofo maligne intensigis la simptomaron de lia malsano kaj konsekvence akcelis la finon de lia vivo.

Por lia konsolo, fidela kaj sincera amikaro lin vizitadis dum la lastaj monatoj de lia vivo. Unu el ili havigis apartan, plej signifan moralan subtenon. Temis pri germana militisto, Majoro Neubarth, apartenanta al la trupoj, kiuj okupis Varsovion, do, kiel ŝerce rimarkis Marjorie Boulton¹, iu “malamika” amiko. Tiel signifa okazo certe evidentigis al Zamenhof la potencon fratigan de Esperanto...

La sciigo pri la forpaso de Zamenhof plej funde trafis la koron de la tutmonda esperantistaro, kies doloro motivis sentoplenajn

manifestiĝojn ne nur ĉe la adeptoj de la lingvo kaj ties idealoj, sub la formo de eventoj, poemoj, gazetartikoloj, sed ankaŭ ĉe lia grandnombra okulista pacientaro, kiu plejparte konsistis el malriĉaj hebreoj loĝantaj en Varsovio kaj kiu amase ĉeestis lian entombigon.

Por fini tiun senpretendan artikoleon, mi reliefigas la korelverŝojn de du eminentaj literatoroj de Esperanto, gigantoj de la Esperanta poezio, nome Gyula Baghy (1891-1967) kaj Kálmán Kalocsay (1891-1976), kiuj poezie omaĝis la karan mortinton.

*De Gyula Baghy
(tiam en Siberia prizono)²:*

“La famon ne brue,
Nur poste, malfrue,
Simile al eĥo de mortkrio,
Mallonga sciigo alportis:
La Majstro mortis.”

De Kálmán Kalocsay (en 1920)³:

En vasta mond' malgranda rond'

Ja estas ni, la fratoj,

Sed kun potenc' en sankta senc'

Kuniĝas la korbatoj.

Ho, kunsonor' de nia kor' !

Funebru la Benatan,

Per kies am', jen, flagra flam'

Kunfandis rondon fratan.

Etingis sin la flam' de l' sin' ,

Plu arde ĝi ne hardas,

Sed jen la Verk', ĝi malgraŭ ĉerk'

Kaj malgraŭ frostoj — ardas!

Kaj en kompren', eterna ben',

Fратиĝu mondo tuta...

Ni laŭdu Lin, ke aŭdu nin

Homaro surdemuta.

¹ BOULTON, Marjorie – *Zamenhof – Aŭtoro de Esperanto* – Ĉapitro XXII – “Mortinta sed senmorta” – La Laguna – 1962.

² PRIVAT, Edmond – *Historio de la Lingvo Esperanto* – Dua Parto – *La Movado* – 1900-1927 – “Dum la Milito” – Leipzig – 1927.

³ KALOCSAY, Kálmán – *Streĉita Kordo – EĤO DE FORTA VOKO* – “Ni laŭdu lin...” – Budapeŝto – 1931.

La evoluado de la Zamenhofa Penso

Nazaré Laroca

La penslinio de Zamenhof varias laŭ la tempo; sed ni vidas du grandskalajn projektojn, kiuj estas: la savo de la judoj kaj la unuiĝo de la tuta homaro. Zamenhof neniam neglektis sian hebrean devenon. La savo de la juda popolo el ĝia tre malfeliĉa stato estis unu el liaj plej karaj revoj. Tiu deziro naskis lian plej gravan ideon: la unuiĝon de la tuta homaro. Oni povas do vidi du flankojn de tiu ideo: Esperanto estas la lingva flanko; la alia estas la religia kaj filozofia.

Surbaze de lia *Projekto de solvo de la hebrea demando* ĝis la verko pri Homaranismo, oni povas iom kompreni la terurajn konfliktojn inter “homo” kaj “patrioto”, kiuj interbataladis en lia koro. Pri la kompleksa “juda demando” (*kio estas juda identeco?*), la juna Zamenhof skribis en 1882:

Jam dum preskaŭ dudek jarcentoj nia popolo migras tra la vasta mondo sen patrujo, sen hejmo, pelata de loko al loko, kiel senhejma orfo, ĉie kuntrenante siajn suferojn, sian eternan ‘demandon’.

Komence Zamenhof subtenis la ideon, ke la orienteŭropaj judoj devas elmigri en Amerikon. Sed ĉar li

suferis multajn kritikojn, li ŝanĝis sian opinion kaj fariĝis fervora adepto de la cionisma liberiga movado.

Oni konas la hebrecon de Zamenhof precipe per liaj leteroj:

El letero al Michaux (1905):

Mi neniam kaŝas mian hebrecon kaj ĉiuj esperantistoj tion ĉi scias; mi kun fiereco alkalkulas min al tiu ĉi tiel antikva kaj tiom multe suferinta kaj batalinta popolo (...) Paroli detale pri mia vivo kaj pri la historio de miaj ideoj sen konstanta ripetado pri mia hebreco estas preskaŭ neeble. Se mi ne estus hebreo el la geto, la ideo pri la unuigo de la homaro aŭ tute ne venus al mi en la kapon, aŭ ĝi neniam tenus min tiel obstine en la daŭro de mia tuta vivo.

El letero al Michaux oni ankaŭ legas pri liaj internaj konfliktoj (1905):

(...) de mia plej frua infaneco en mi ĉiam superregadis la homo, tamen pro la malfeliĉega stato de mia popolo, en mia koro ofte vekigadis la patrioto, kiu terure bataladis en mia koro kontraŭ la homo. En la lastaj 10 jaroj la homo kaj patrioto iom post iom interpaciĝis en mia koro en formo de “Hilelismo”, [...] kies

esencon mi kredeble publikigos post unu aŭ du jaroj.

Hilelismo estas doktrino inspirita de rabeno Hilelo, samtempulo de Jesuo Kristo. Zamenhof adoptis ĝin kadre de sia propono pri solvo de la hebrea demando, en 1901.

Iom pri Hilelismo (laŭ Zamenhof):

Unu libron pri la Hilelismo difinitan speciale por la rusaj hebreej kaj verkitan en lingvo rusa mi jam publikigis (sub la tre sekreta pseŭdonimo “Homo sum”) antaŭ kvar jaroj; sed pri tiu ĉi libro preskaŭ neniu scias, ĉar mi sendis ĝin al neniu gazeto kaj nur cirkuligis ĝin kiel “ballon d’essai” [provbalono] inter negranda nombro da inteligentaj hebreej.

La libro *Hilelismo* temas pri religio por la judoj, ne por iu ajn, kiel la posta Homaranismo:

Radiko de la tuta hebrea demando enestas en la hebrea religio; do restas nenia dubo en tio, ke solvo de la hebrea demando estas ebla nur kaj sole per vojo de ŝanĝo de la hebrea religio.(...) Hilelismo estas do nova religia partio, kiun ni intencas fondi en la sino de ĝis nun ekzistanta hebrea religio (...).

Esenco de la Projekto:

1. Purigi la hebrean religion por ke ĝi ĉesu esti por ni eterna

malhelpaĵo en ĉio, kaj por ke ĉiu el ni povu sen hipokriteco kaj memkontraŭparolo malkaŝe kaj fiere konfesi sian religion kaj edukadi en ĝi siajn infanojn.

2. Krei por la hebreej propran lingvon por ke ni, se sorto destinis al ni esti popolo, ĉesu esti eternaj nuloj kaj spiritaj parazitoj inter popoloj.

Rezulte:

Hebreeco fine ĉesos esti eterna malfeliĉo, hebreej fariĝos similaj al ĉiuj ceteraj homoj. Ni havos koralligĝon al io, ni havos esperon al io.

Post la Bulonja kongreso, Zamenhof skribis tre gravan leteron al Javal, pri sia “Projekto de solvo de la hebrea demando”:

Tiu ĉi projekto, kiun mi pli aŭ malpli frue intencas prezenti al la mondo sub la nomo de “Hilelismo”, estas la plej grava el ĉiuj laboroj, kiujn mi iam faris aŭ faros. Ĝi prezentas per si en plena finiteco tiun ideon, al kiu mi dediĉis mian tutan vivon; la tuta afero Esperanta estas nur parto de tiu komuna ideo, kiun mi nomas Hilelismo. La celo de la Hilelismo estas: unuigi la homaron en unu fratan familion (ne timu, mi ne fantazias).

La celo do estas tute alia ol tiu de la

projektoj de 1900 kaj 1901, ĉar la antaŭa Hilelismo celis solvi nur la problemon de la judoj.

Laŭ M.Boulton: *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto*. 1962:

Hilelismo ne sukcesis. (...) Persekutemaj fanatikuloj tute ne deziras liberiĝi de siaj psikaj malsanoj. (...) Sed hilelismo tre bone montras la humilecon kaj amon al la homoj, kiuj estis konstantaj faktoroj en la vivo de Zamenhof.

Zamenhof eldonis siajn tezojn pri la starigo de nova, neŭtrala homa religio, bazita ankaŭ sur nova, neŭtrala homa lingvo. Se la cionismo eluzis la romantikan paradigmon, strebante, ke oni parolu pri judo kun la sama respekto kiel pri franco, germano, ruso ktp, Zamenhof pledis, ke oni entute forgesu, kio estas judo, franco, germano, ruso, ktp.

El *Letero al Javal* (1906), Zamenhof asertas:

Laŭ mia profunda konvinko la Hilelismo prezentas la solan veran kaj justan solvon de ĉiuj naciaj kaj religiaj demandoj, kaj la vero kaj justeco pli aŭ malpli frue devas venki, kiel ajn forte oni ĝin atakadus en la komenco.

Mi nur forte bedaŭras, ke mia ruinigita sano kaj la ĉiam kreskantaj devoj rilate mian familion ne

permesas jam al mi labori tiel energie, kiel mi dezirus (...).

Homaranismo

En 1906 eble ĉar la nomo Hilelismo sonas jude, Zamenhof ŝanĝis la nomon de sia kredo al Homaranismo; sub ĉi tiu titolo li eldonis rusan kaj esperantan broŝurojn, kiuj aperis anonime en Sankt-Peterburgo.

Zamenhof intencis prezenti Homaranismon en la La Dua Kongreso Esperantista en Ĝenevo (la 28-an de Aŭgusto 1906), tamen li decidis silenti pri la religio.

En Ĝenevo li parolis pri la interna ideo, kiu nun, kiam ni konas la ideojn pri homaranismo, aperas kiel pala kaj svaga ĉirkaŭirado de lia plej grava temo.

Zamenhof certe suferis, ne povante esprimi siajn plej profundajn sentojn.

Li tre bone sciis, kia grandega danĝero povus aperi por la afero Esperanta, se li ligus la religian projekton kun la esperantismo.

(El la prelego de Christer Kiselman.
UK 2009 - Bjalistoko)

En la jaro 1913 Zamenhof deziris aranĝi sendependan kongreseton pri neŭtrale-homa religio. Sed li ne volas mem elpaŝi publike kun la religia demando: li serĉas alian personon. Sed Bourlet konsilis lin ne okazigi

tian kongreson en Francujo. En Junio Zamenhof estis jam findecidita, ke ankoraŭ ne estas la ĝusta tempo por pli propagandi Homaranismon.

Tamen *La Deklaracio pri Homaranismo* estas publikigita en Esperanto en 1913, finfine sub la nomo de Zamenhof:

“La ĉi tie donata Deklaracio prezentas mian politika-religian kredon. Ĉar oni konas min kiel aŭtoron de Esperanto, tial multaj personoj eble identigos la homaranismon kun Esperanto aŭ kun la tiel nomata "interna ideo de la esperanto" - tio tamen estas eraro.

Dum la esenco de Esperanto estas plena neŭtraleco kaj esperantisma ideo prezentas nur nedifinitan fratecan senton kaj esperon, kiujn nature naskas la renkontiĝado sur neŭtrala lingva fundamento,

(...) la homaranismo estas speciala kaj tute difinita politika-religia programo, kiu prezentas mian kredon pure privatan kaj aliajn esperantistojn tute ne koncernas.

Mi estas homarano: tio signifas, ke mi gvidas min en la vivo per la sekvantaj principoj:

I. Mi estas homo, kaj la tutan homaron mi rigardas kiel unu familion; (...)

X. (...) Sed kia ajn estas mia religio, mi konfesas ĝin laŭ la

neŭtrale-homaj principoj *homaranaj*, kiuj konsistas en jeno:

a) La plej altan por mi ne kompreneblan Forton, kiu estas la kaŭzo de la kaŭzoj en la mondo materiala kaj morala, mi povas nomi per la nomo “Dio” aŭ per alia nomo (...).

b) Mi konscias, ke la esenco de la veraj religiaj ordonoj kuŝas en la koro de ĉiu homo sub la formo de konscienco, kaj ke la ĉefa por ĉiuj homoj deviga principoj de tiuj ordonoj estas: agu kun aliuloj tiel, kiel vi dezirus, ke aliuloj agu kun vi. (...)”

Lastaj pensoj de Zamenhof

Laŭ Edmond Privat, sur la skribotablo de Zamenhof kuŝis lasta manskribaĵo krajona, nefinita. Ĝi estis plano de artikolo pri senmorteco de l' animo.

Sur kvarpaĝa papero li komencis skribi la intiman konfesion. Tamen morto lin interrompis.

“(...) *Mia patrino estis religia kredantino, mia patro ateisto. En mia infaneco mi kredis je Dio, kaj je senmorteco de l' animo, en tiu formo, en kiu instruas mia denaskiĝa religio.*

Por kio mi vivas, por kio mi lernas, por kio mi laboras, por kio mi amas? Ĉar estas ja tiel sensenca, senvalora, tiel ridinda.”

Tie haltas la konfeso. Sur blanka fino de la paĝo nur kuŝis noto pri la sekvo projektita.

Post la naŭzo pri vivo kaj pri morto, deksepjare, li eksentis ion novan:

Mi eksentis, ke eble morto ne estas malapero... ke ekzistas iaj leĝoj en la naturo... ke io min gardas al alta celo...

Tiuj estas lastaj vortoj de l' skribaĵo. Mortante, Zamenhof for-

portis la sekreton sian.

Tamen Zamenhof respondis al kongreso de kristanaj gejunuloj salutinta lin:

Mi estas nur hebrea homarano liberkreda; sed ... kio pli bela en la mondo ol plena sekvado al instruo de Jesuo?

(Edmond Privat: *Vivo de Zamenhof*. 1920)

Mi finas ĉi tiun artikolon per modesta omaĝo al nia Majstro:

Signoj

*Je l' vojmezo de l' urbaj ĝangaloj
l'anim' de l' mond' vagadas
baraktante tra bruega lumo.*

*Kvankam l'arbareg' ne obskuras,
ĝi vojiradas blinde
laŭ riveroj el fantomoj hidaj:
Perfort' regas, ĉifonas moralo;
barbarajn senkapigojn
oni spektas per televidilo.*

*Ho Dio! Kien homaro iras?
Ĉu l' mondanim' fiaskis?
- Ne! - ekkrias idealo:
L' espero pacience obstinas...*

Haluk Mesci (Turkujo)
Esperantigis Vasil Kadifell
(El la revuo Turka Stelo, n° 20)

En tiu tago mi estis en mia kutima laborejo, Queen strato Hakim Optiko, en la unua servo-tablo tuj post la enirejo. La homo, kiun mi salutis per mia kutima rideto, ĉu li estis honesta?

Laŭ mi lia rideto estis pli sincera ol la mia, li estis blankhara, kutima kliento. Sur sia ĝinzo kies koloro estis paliĝinta, li alportis T-ĉemizon kies vera koloro estis nigra sed ĝi tiam aspektis griza. Liajn ŝuojn mi eĉ ne vidis.

“Mi havas malgrandan problemon” li diris, kaj etendante malgrandan nigran ingon al mi, li mal-fermis ĝin. Li elmontris sun-okulvitrojn, kiuj estis nespecialaj, sen markaj, kaj malmultekostaj. Ĉar la dekstra ŝraŭbeto estis falinta, la okul-vitroj kaj ĝia dekstra tigo estis apartaj.

“Ha, nenio grava ĝi estas” mi diris. “N u r d u minutoj...”

Prenante la okulvitrojn mi min direktis al la teĥnika parto en la malantaŭo de la magazeno.

Kiam mi revenis la dekstra ŝraŭbeto estis en sia loko, kaj la alia ankaŭ estis streĉita. Mi viŝis la vitrojn, kaj etendante ilin mi diris “sunbrilajn tagojn mi deziras al vi”.

Li demandis sian ŝuldon. Li estis sincera. – Mi ridis, “nenio” mi diris. – Li haltis. Li rigardis en miajn okulojn. Post momento li kun sia sincera rideto demandis min, “ĉu floro aŭ papilio?”

Ne povinte pensi sufiĉe pri la demando por ke mi komprenu ĝian signifon, mi diris “papilio”.

Ne povinte pensi sufiĉe pri la demando por ke mi komprenu ĝian signifon, mi diris “papilio”.

Li remetis la malgrandan ingon, en kiu li metis la okulvitrojn, en sia poŝo kaj diris “donu al mi viajn manojn mia knabino”. – Li etendis siajn manojn super la tablo kaj prenis la miajn, li ilin iomete altiris al sin kaj kunmetis ilin kune en siaj manoj. Li momente restis tiel. Poste li turnis sin kaj eliris.

Ĉu mi mem malfermis miajn manojn pro konfuzo, aŭ ĉu ili memmalfermiĝis, mi ne scias.

El miaj manoj, malrapide elflugis papilio, kiu estis granda nur kiel la najlo de mia dika fingro. Ĝi ne forflugis, ĝi estis kunfrapanta siajn



flugilojn kaj ŝvebanta en la aero antaŭ mi, kvazaŭ nur por mia ĝuado. Ĝi estis la plej bela papilio, kun la plej brilbuntaj flugiloj, mi iam ajn vidis.

Miaj okuloj kaj buŝo devis esti ege mafermitaj pro mia konfuzo. Mi mire

restis tiel, rigardanta al briletojn kiuj elŝpruĉis el ĝiaj flugiloj, ĝis ĝi malaperis. Sed mi povus resti tiel, rigardante ĝin ĝiseterne.

Mi nun pensas, ke la tempodaŭro devis esti “nur du minutoj”...

Nekrologo*Floriano Negreiros de Pessoa*

Kun granda bedaŭro la brazila Esperantistaro eksciis pri la forpaso de eminenta brazila samideano, je la 9-a de aŭgusto 2017.

Floriano Pessoa estis vere neordinara persono. Mi ne scias, kiun spiritan trajton oni devas elekti kiel la plej altan, inter liaj multaj. Min aparte ĉiam impresis lia saĝeco: ĉar li konstante kaŝis ĝin sub dika tavolo da modesteco. Li estis inteligenta kaj klera, homo de alta kulturo. Ne nur erudicia, sed meditema pri siaj vastaj konoj.

Floriano amis muzikon, ŝakon, vinon. Li malamis vulgarecon, sed mi neniam perceptis akrajn kritikojn el lia buŝo aŭ el lia plumo. Male, li estis ekstreme tolerema kaj milda, kiam li devis esprimi ian kontraŭan opinion.

Pri lia stilo, kiel preleganto kaj verkanto, en Esperanto kaj en la portugala lingvo, oni devus fakte fari detalan studon. Dum sia tuta vivo li legadis kaj relegadis niajn klasikulojn, kaj klopodadis sekvi ilian vojon en siaj propraj verkoj. Oni certe povas diri, ke Floriano Pessoa estas nia moderna klasikulo. Tion pruvas la libro “Vintra Rikolto”, publikigita antaŭ nelonge, en Brazilo. Laŭ mia scio, ĝi estas lia sola libroforma publikaĵo. Tiu libro estas donaco, kiun la kara Floriano delikate lasis al siaj geamikoj. Oni devas legi kaj relegi ĝin, eĉ trastudi ĝin. Se iam oni konstruos superan kurson de Esperanto inter ni, tiam certe tiu libro devos stari inter la rekomendataj verkoj.

Ni funebras, ĉar ni perdis modelon de amiko, modelo de majstro, modelo de Esperantisto. Ni ne forgesos vin, kara Floriano!

La Sperto en la Mondo de Legado

(Persona rakonto pri graveco de legado en homa vivo)

Aleksandro Prado

Kiu estas la plej granda invento de la homo? Tiu, kiu tute ŝanĝis la vivon de la socio aŭ kiu plibonigis la vivon de homoj? Eble tiu granda kreaĵo de homo povas esti tre malnova sed ankoraŭ tre aktuala. Multaj eble diras, ke la homaro revoluciĝis per la invento de fajro aŭ rado, sed la granda invento de la homaro estas la skribado.

Imagu: povi esprimi niajn sentojn kaj pensojn al la ekstero per parolado estas fantaste; kaj nun, oni povas materiigi tiujn pensojn kaj emociojn per skribado. Laŭvorte materiigi kaj skulpti niajn pensojn. La skribado de la sumeranoj ŝajnis skulptita - la unuaj simboloj, kiuj fariĝis la nuntempa skribo. Mi volas diri tion: skribo estas simila al komuniko, kiu okazas en nia koro,

kaj legado estas la sciigo pri tio, kio okazas en la menso de nia najbaro.

Dum mia infanaĝo mi a d m i r i s mian avon kaj ĉar li h a v i s

multajn librojn. Ŝajne ili estis tre bonaj, ĉar li legadis ilin dum la tuta nokto. Por kontentigi mian scivolemon, li aĉetis komiksojn por mi. La tempo pasis kaj mi memoras bone, kiam mi akompanis mian patrinon al la urba biblioteko. Tio estis la socia maniero, kiu certigos jarojn de vojaĝado al la mondo de la legado. Al mi ŝajnis, ke mi venas en templon. De tiam rigardis en tiu malgranda biblioteko sciencajn librojn, ĉar scienco allogas min. Tamen, mi legis ankaŭ klasikajn tekstojn de Machado de Assis kaj ankaŭ ne klasikajn, sed altvalorajn, kiel *Harry Potter* de JK Rowling. Je ĉi tiu, mi vere forgesis la mondon kaj flugis sur la plej altan nubon kaj plonĝis en la plej profundan oceanon.

Do, skribado kaj legado estas por mi la plej granda invento de la homo. Per ĝi ni scias, kion aliaj pensas. La brazila poeto Olavo Bilac diris, ke por kompreni stelojn estas necese ami. Por ĝui legadon kaj skribadon estas necese ami tiun arton,. Mi amas ĝin kaj estas dankema al mia instruisto, kiu unue instruis al mi legadon kaj skribadon.



Miaj spertoj en cirkoekzercoj

Anna Lobo

Mi komencis la cirkoekzercojn en aŭgusto de 2014. Kiam mi decidis provi, mia unua penso estis la ebleco amuziĝi kune kun tre peza ekzerco por la korpo. Do mi iris al spaco ĉi tie en São Paulo, kiu nomiĝas *Arena de Artes*, kaj tio ege bone funkciis por mi, se oni konsideras, ke mi survojas al tri jaroj de praktikado!

La cirko estas bona por la korpo kaj ankaŭ por la menso. Unua aspekto, estas ke vi ne bezonas senti sin malbone kiam vi ne sukcesas ion je la unuaj fojoj. Vi komencas akcepti, ke vi rajtas erari, vi ne bezonas esti perfekta de la komenco. De tio venas la dua, la persisto, tio estas, fari kaj refari la movojn ĝis vi komprenas ĝin, ĝis vi senpene faras ĝin, ĝis vi ege facile faras la movojn. Estas nekredible rimarki, ke laŭ la tempopasado, vi pliboniĝas kaj faras aferojn kiuj, por la plej multaj homoj, estas neimageblaj aŭ ege malfacilaj. Nur tio donas jam multe da memfido. Sed, la plej bona sento estas percepti ke vi iom post iom superas viajn limojn kaj timojn. Kiel kiam vi ege timas rilaksiĝi en truko aŭ pozicio, vi timas forlasi la manojn, sed tamen vi lasas; kiam vi timas la altecon sed eĉ tiel vi iras tien kaj eĉ al kutimiĝas esti tie, aŭ ĉefe en trukoj en kiuj vi falas - Jes! tio ekzistas! Vi estas tie, en la alteco, kun la truko muntita, kaj vi devas fidi je vi, je la ilo, kaj havi la kuraĝon salti, la kuraĝon liberiĝi. Tio estas nekredbla!

Kiam mi komencis la cirkoekzercojn, multaj muskoloj, pri kiuj mi pensis, ke ili ne ekzistas, subite aperis. La percepto pri la pozicio de mia korpo en la spaco, pri tio, kiel mi moviĝas, ankaŭ estas multe pli bone. Same okazas pri la timoj, mi multe pli bone rilatiĝas al timoj nuntempe. Mi memoras la unuan fojon, starante sur trapezo – Kiel forte mi timis tion! Sed post kelkaj fojoj – Ah! Estis nur tio?

Bone, ĉiam venas sama sento, kiam oni lernas ion novan, sed pro tio ke ĉiam oni lernas iun novan trukon, la



timo pri novaj aferoj mildiĝas iom post iom. Mi ankoraŭ timas foje, sed mi ne perfortas min, do mi faras ĉion laŭ ebleco, senhaste. Do, de tiu praktikado, ĉiam estas io por porti ankaŭ al la persona disvolviĝo kaj por la vivo.

La koncentriĝo estas tre grava, ĉar oni devas atenti pri la movoj, pri tio, kion oni faras en la momento. Oni

estas devigata koncentriĝi, male oni povas fari misojn kaj misfali. Kiel mia instruisto diras al ni, estas pli facile, ke oni vundiĝas sur la grundo post iu truko, ol dum la truko mem, ĉar oni atentis, tenas, ĝuste pro timo vundiĝi. Pro tio, oni iom pli perceptas la nunon, ĉar dum la praktikado, vi pensas pri la movoj, pri tio, kiel fari plej bone kaj kompreni la korpon.

Ni ridu iomete...

Inĝenieroj

Flugkompanio invitis grupon da profesoroj kaj asistantoj el Fakultato de Inĝenierarto por inaŭgura flugo en nova, moderna modelo de aviadilo. Post kiam ĉiuj komforte sidiĝis en la flugmaŝino, voĉo per laŭtparolilo informis, ke ĉi tiu nova modelo estis konstruita de studentoj de tiu sama fakultato – de iliaj lernantoj mem.

Ĉiuj eksaltis teruritaj kaj panike eliris el la aviadilo. Nur unu maljuna profesoro trankvile restis sur sia sidloko.

Post iom da tempo, stevardino alproksimiĝis.

– Ĉu vi ne timas, Sinjoro Profesoro?

– Tute ne! Se miaj gelernantoj konstruis ĉi tiun aviadilon, tiam mi estas certa: ĝi ne moviĝos eĉ unu metron for de ĉi tie.

Entreprenema Knabino

Bela junulino sidas sur ĝardeno benko. Subite, saltas sur ŝian genuon malbela bufo.

– Kara fraŭlino – ĝi diras – fakte mi estas profesoro pri Filozofio, kiun fia sorĉistino transformis en bufaĉon.

– Ho, mi bedaŭras, Sinjoro Profesoro.

– Sed vi povas liberigi min, fraŭlino. Se vi kisas min, la sorĉo malfariĝos. Mi estos tiel danka, ke mi eĉ promesas poste edzinigi vin!

La junulino metas la bufon en platan sakon kaj ekiras hejmen.

– Kio okazas, fraŭlino? Ĉu vi ne kisas min?

– Tute ne, Sinjoro Profesoro. Mi gajnos multe pli da mono per parolanta bufo ol kiel edzino de profesoro pri Filozofio.

Carlos Torres Pastorino kaj lia vidpunkto pri Esperanto

La ĉi-suban tekston sendis al ni la konata esperantistino Dirce Sales, kun sugesto, ke *Rio Esperantista* ĝin publikigu, por ke novaj generacioj sciu tion, kion pensis pri nia lingvo unu el la plej kleraj kaj saĝaj homoj, kiuj okupiĝis pri Esperanto en Brazilo.

Esperanto estas praktika lingvo, ĉar Zamenhof kaptis ĉion, kio estas facila: iujn gramatikajn regulojn li prenis el la hebrea lingvo, kaj tio faciligas la lernadon al hebreoj, araboj, unuvorte por la semidoj, ĝenerale.

La sistemo de vortfarado per prefiksoj kaj sufiksoj, kaj per simpla kunmetado estas uzata de ĉinoj, japanoj, slavoj kaj saksoj (ankaŭ en

la latina lingvo), kaj tio faciligas Esperanton.

Krome, el la kulturlingvoj en okcidento, li elprenis la plej oftajn radikojn, inter kiuj multaj estas internaciaj, kio faciligas la aferon por ni mem.

Tial, ĉiuj popoloj opinias, ke Esperanto estas facila kaj praktika, kaj havas la senton, ke tiu lingvo estas farita “por ili”.

Fonto: Elementa Metodo de Esperanto (paĝ177), por radio kaj korespondado.

Radio MEC, 1956.

Brazila Esperanto-Ligo

Prof. Carlos Torres Pastorino, Profesoro pri la Latina Lingvo en Militista Kolegio kaj Kolegio Petro la II-a, en Rio-de-Ĵaneiro.

Rim.: Ĉi tiun kurson oni ellaboris surbaze de la deziro de Zamenhof (aŭtoro de la Internacia Lingvo Esperanto), kiu konsideris la praktikan aspekton kaj direktis ĝin ne nur al la klera publiko, sed ankaŭ al la popolamasa.

“... ofte (precipe en vivaj dramaj dialogoj) pli bona estas frazo ne tute logika kaj ne perfekte preciza, sed mallonga kaj viva, ol frazo perfekte preciza, sed enuige peza kaj tro kabineta” (Zamenhof, “Lingvaj respondoj”, 25, La Revuo, 1907, oktobro.”



Prof. C. T. Pastorino

Tatjana Loskutova, Ivanovo, Rusio

(Daŭrigo de teksto aperigita en Rio Esperantista 201)

Rio-de-Janeiro

Multaj rusianoj konas grand-artifikulon de ĉiuj tempoj kaj popoloj Ostap-on Bender (ĉefan heroon de la romano de I. Iljĵ kaj E.Petrov „12 seĝoj“) kaj lian „kristalan“ revon – per unu okulo ekvidi Rio-n kaj defili laŭ Copacabana en blanka pantalonon kaj blanka ĉemizo... Tial veninte al Rio mi rigardis ĝin per ambaŭ okuloj transfenestre de buso kaj sentis ondon de optimismo kaj de ĝojo, avara scivolemo penetradis min. Do, neniu en Rio surmetas blankan pantalonon, eĉ ne ĉiuj surmetas blankajn ĉemizojn! Dum konstanta varmo oni preferas ŝortojn kaj senmanikajn ĉemizojn de iu ajn koloro. Veninte 4 tagojn antaŭ la 50a Brazila Kongreso de Esperanto mi ŝatis iom revizii kaj poluri mian prelegon. Por tio taŭgis la sidejo de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj (prezidanto Givanildo Ramos Costa) en Rio, kien min akompanis Valeria Mattos, mia gastigantino. Fondita en 1951 jaro, 5 jaroj poste ĝi aĉetis propran sidejon en urbocentro de Rio. Tie okazas lecionoj kaj prelegoj, konversaciaj rondoj kaj kunsidoj, artaj prezentadoj kaj amikaj renkontiĝoj.



Ostap Bender, interpretata de Adrei Mironov, 1976

Krome, en tiu sidejo funkcias libro-servo kaj ekzistas riĉa biblioteko, kiun mi iom trarigardis : plejpartas libroj eldonitaj en Brazilo, ĉar dum pli ol 30 jaroj la KKE estis unu el la plej elstaraj eldonejoj de libroj en kaj pri Esperanto. Nun post kelk-jara paŭzo ĝi revenas al la E-merkato ne nur per libroj, sed ankaŭ per diskoj, revuoj kaj aliaj esperantaĵoj. La KKE eldonas dumonatan esperanto-lingvan revuon, samformatan kiel *REGo*, kun koloraj paĝoj kaj koloraj fotoĵoj. La estraranoj de la KKE afable disponigis al mi la komputilon. Fininte bezonatan pretigon, mi konversacias jen kun unuj el ĉeestantoj, jen kun la aliaj kaj poste adiaŭas ĝis renkonto dum-kongrese.

Same, kiel en Santos, mia gastiganta familio loĝas ĉe la oceano, tial mi ne preterlasis eblecon sunbruniĝi kaj naĝi matene antaŭ promeni tra Rio vizitante kelkajn vidindaĵojn. Metroo ligas ankoraŭ ne ĉiujn partojn de Rio, pro tio oni devas veturi perbuse aŭ taksie. Same kiel en metroo, veturo en busoj (iuj kun klimatiziloj –brr!, aliaj – sen, sed kun malfermitaj fenestroj) ankaŭ estas senpaga por pensiuloj. Vizitoj al ceteraj municipaj muzeoj kaj ekspozicioj estas tute senpagaj, tial mi profitis eblecon konatiĝi kun iliaj trezoraĵoj. En unu el muzeoj mi ekvidis hazarde teatrajn afiŝojn kaj prospektojn. Kaptis mian atenton vortoj *A febre do samba*, kiujn ne problemis tuj kompreni: sendube, mi ŝategus spekti samba-dancojn tra riĉa historio de karnavaloj en Rio. Al mi bonŝancis, ke tiumomente mi estis kun loka esperantistino, kiu ankaŭ ne pretelasus ĉi-teatraĵon, kaj ni ekrapidis al teatro SESI. Post starado ĉe teatra kasejo en vico de dezirantoj lastmomente aĉeti biletojn ni pasigas du horojn admirante surscene artistojn de tri civilizacioj – indiana, eŭropa kaj afrika, kiuj donacis al ni brazilajn ritmajn kantojn kaj vituozajn dancojn, kiuj entuziasmigis ĉeestantan publikon danci fine de la prezentado. Alian tagon ni decidis supreniĝi al montoj

Urca kaj Pão Açúcar. Deziro malaperis rigardante de malsupro kiel balanciĝas kablotramo inter du montoj je ege granda alteco: mi ne estas timemulino, tamen ekstremajoj ne eniris miajn vojaĝplanojn. Ĉe la montoj – tropika arbara parko. Dum promenado sur ĝiaj vojetoj ni ekvidis malgrandajn sovaĝajn simiojn kun longaj maldikaj vostoj, kies konduto similis al nialandaj sciuroj.

Dum la vojaĝo preskaŭ ĉiam mi estis je akompano de lokaj gesperantistoj, tial mi ne sentis bezonon je portugala lingvo. Pluse, mi estis avertita anticipe de Emilio Cid, ĉefdelegito de UEA, ke se mi troviĝos sola en urbe kaj nepros komunikiĝi kun lokanoj, paroli malrapide en Esperanto. Feliĉe tion mi jam spertis en 2006 dum la vojaĝo al Portugalio : ceteraj portugalaj vortoj similas laŭ formo,



La spektaklo *A febre do Samba*

aliaj laŭ signifo al esperantaj: oriente, nordo, centro, turismo, fenomeno, instituto, numero, oceano, monumento, moda, problema, moderna, tomato ktp. Veninte al Brazilo mi konstatis, ke civitanoj neniu fremdan lingvon scias: eĉ la angla ĉi-tie ne estas favorata. Tial antaŭ vojaĝo oni lernu la portugalan aŭ kunprenu konversaci-libron, alimaniere oni devos kompreniĝi pergeste...

La 50a BKE

Kaj jen alvenis tago, kiam komenciĝis jubilea Brazila Kongreso de Esperantistoj kun la temo «Ĉu ni sukcesis?». Ĝi okazis de la 23a ĝis la 27a de januaro 2015 en konstruaĵo de UERJ - Universitato de la Ŝtato Rio-de-Janeiro kun partopreno de ĉirkaŭ 250 personoj, inkluzive malgrandan dekon da eksterlandanoj. En la sama marta 2015 numero de la revuo «Esperanto» de UEA sur la paĝo 64 oni povis legi artikolon de Fabiano Henrique pri la kongreso. Evidente, mi ne rajtas taksi rezultojn/sukcesojn de Brazila E-movado. Tial mi priskribu tion, kio agrable impresis min, eksterlandaninon, kiu havis dum sia kelkdeka esperantisteco vizitis multajn diversnivelajn E-aranĝojn : afableco de kongresanoj, bona scipovo de Esperanto de plejparto de la partoprenantoj kaj tute klara ilia

prononcmaniere, riĉa elekto de E-literaturo kaj de diversaj esperantaĵoj prezentitaj de BEL, KKE kaj de la eldonejo Lorenz (prezidanto Robinson Mattos), sufiĉe amasa ĉeesto de kongresanoj en programeroj, riĉenhava prelego de la prezidinto de BEL Pedro Cavalheiro dum la malfermo, okazigo de diversaj kaj kelknivelaj E-kursoj, elokventa prelego de Anton Oberndorfer pri fondiĝo kaj funkcio de E-retradio, arta vespero kun bonkvalitaj prezentaĵoj. Mi ĉeestis unu el kunvenoj de brazila junularo, kiu tiam okazigis samtempe sian la 35an Brazilan Esperantistan Junularan Kongreson. Sub gvido de la prezidanto de BEJO Fernando Jorge P. Maia oni priktraktis E-bonnivele problemojn de sia organizo kaj ĝiaj perspektivoj. Danke mi akceptis afablan helpon de la LKK-anoj (s-roj Fernando Pita, Marcio S. Nascimento, Allan Argolo) en teknika organizo de mia progresiga kurso kaj mia prelego. Meze de la kongresa programo, dimanĉe – ekskursita tago. Tiuj, kiuj deziris partopreni en unu el du ekskursoj (duon- kaj plentaga), devis pagi anticipe. Nur proksimume 30 kongresanoj veturis en ambaŭ busetoj, supozeble pro multkosteco de ekskursoj. De unu flanko ekskurso estis tre interesa por mi, de

alia - iom ĝena, ĉar ĉiceronoj ne estis esperantistoj kaj inter kunveturintoj ne multis E-fluparolantoj. Tamen, la veturo tra Rio kaj al la fama statuo de Cristo Redentor, simbolo de la urbo, estis tre allogaj. Ni ekvidis (vere, nur tra feraj kradoj) faman sambadromon por ensorbi laŭeble atmosferon de la plej granda karnavalo en la mondo okazanta februare; originalan katolikan katedralon, konstruitan en 70-aj jaroj de la pasinta jarcento, kiu laŭ sia formo pli similas al piramido de majaoj kaj kie en tiama mateno aŭdiĝis dimanĉa meso, kaj maldekstre de ĝi same neordinaran sonorilejon; «katedralon» de la dua religio en Brazilo, t.e. futbalo, – stadionon Maracanã kaj monumenton al brazila nacia teamo. La fina celo de nia ekskurso - la statuo sur la monto Corcovado. La buseto malrapide suprenrulas laŭ serpentuma vojo. Post duohoro – elbusiĝo, staro en kurta vico: ni ja estas grupvizitantoj. Apude videblas longa vicego de kompatindaj vizitontoj atendantaj dum kelkaj horoj sian eniron sub bruliga suno. Nia ĉiceronino aĉetas enirbiletojn. Ŝanĝo de buseto. Supreniĝo per lifto, poste per du eskalatoroj. Amasego da homoj, plejparte brazilanoj, tumultas ĉe la statuo. Ĉiuj fotas ĝin kaj sin sur ĝia fono, fotas pitoreskan

panoramon de Rio kun ĝia neordinara pejzaĝo kaj laguno, neĝblankajn ĉielskrapulojn, brilantaj subsune, multkilometrajn plaĝojn kun ŝaŭma surfo, deklivojn kun verdaĵoj... Posttagmeze ekskurso finiĝis, sed kelkaj el ni entreprenas memstaran busvojaĝon laŭ la plej longa (pli ol 13 km) kaj alta ponto ne nur en Brazilo, sed ankaŭ en Suda Ameriko. Ĝi ligas la urbojn Niteroi kaj Rio de Ĵanejro. Niteroi estas plej konata pro kelkaj konstruaĵoj de Oscar Niemeyer, unu el fondintoj de moderna brazila skolo de arkitekturo. Ni vizitas la muzeon de moderna arto, kies eksponaĵoj ne ĉiam facilas kompreni kaj inde apreci. Laŭ sugesto de Wandemberg R. Morais, prezidanto de LKK de la 87a UK en Fortalezo 2002, ni revenas al Rio per ŝipeto.

Kio por mi estis/estas Brazilo? Krom abunda vegetaĵaro, suno kaj plaĝoj, mi ĝuis kontaktojn kun brazilanoj, simplaj kaj amikemaj, afablaj kaj bonkoraj homoj, ĉiam pretaj helpi. La Esperanto-fono de la vojaĝo estis plia pozitivaĵo por sopiri pri la pasigita tempo en la lando. Al Brazilo endas veturi. Do, al la lastaj vortoj de la kanto «... Ekvidos ĉu Brazilon mi dum mia vivo - ĉu?» mi povas feliĉe respondi : «Jes!»

11^o Congresso Paulista de Esperanto



Realização:

easp

80
ANOS

1937 - 2017

12 - 15 outubro 2017
São Paulo - SP

easp.org.br/asocio/kongreso



53-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

38-a Brazila Esperantista
Junulara Kongreso

informoj: www.esperanto.org.br

Renkonto de Esperantistoj

en la Paraiba Valo



Volta Redonda/RJ
12-a de novembro 2017
de la 9h ĝis la 16h30

Loko: GACEMSS – Rua 14, nº 315

Vila Santa Cecília – Volta Redonda-RJ

